

LA PROGRESO

ČEĤOSLOVAKA ORGANO ESPERANTISTA. ★ ĈESKOSLOVENSKÝ LIST ESPERANTSKÝ.

Aperas monate. Jara abono Kč 20.—, eksterlande Kč 25.— (por 10 numeroj), Specimen-numeroj Kč 2.— ni 2 resp. kuponoj. — Gvidas redakcia konsilantaro. — Redakcio: Plzeň, Houškova ul. 32. — Administranto: Frant. Kavan, komercisto, Plzeň, Poděbradova tř. 6. — Konto de la Poŝta ŝparkaso ĉs. n-ro 5203, aŭstria n-ro 169.352. — Telefono: 732/VI. — La manuskriptojn oni ne resendadas.

EN NOVAN JARON.

Kvar jaroj forpasis de tiu tempo, kiam aperis unua numero de »La Progreso«. Kia ĝojo ekregis inter bohemiaj esperantistoj, kiuj estis tiam sen iu ajn esperantista gazeto, ĉar komence de la mondmilito malaperis ambaŭ, en Praha eldonataj organoj! Samtempe samideanoj el Vieno ĝoje akceptis tiam nian gazeton, ĉar en tiama Aŭstrio ekzistis ankaŭ neniu, kaj ili abonis grandan nombron da ekzempleroj. Eĉ inter hungaraj samideanoj evoluis rimarkinda intereso pri »La Progreso«. Milita tempo estis por esperanto tre malfavora pro ĝiaj pacamaj ideoj. Malfacilan problemon, sendi la gazeton en landojn de Entente, ni solvis nur per helpo de unu nederlanda samideano.

Iom post iom pligrandiĝis la nombro da abonintoj, iom post iom plenumiĝis tendencoj de la eldonantaro — esti kiel eble plej multe utila al nia movado. Antaŭ ĉio ni laboris por tio, ke bohemiaj esperantistoj unuigu. Tio sukcesis kaj estis fondita »Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista«. Mulfe da penado ni dediĉis por enkonduko de nia internacia lingvo en lernejojn. Ankaŭ tio sukcesis. Fine »La Progreso« esprimis ideon aranĝi la XIII-an Universalan Kongreson en Praha, kiu atingis plej grandan sukceson.

Rezultato de nia ĝisnuna laboro estas kontentiga kaj ni intencas ankaŭ en estonteco entuziasme labori por esperanto ĝis ĝia fina venko.

Nun ni komencas kvinan jarkolekton de nia gazeto. Ni scias, ke nia tasko ne estos facila, sed tamen ni promesas, ke ni penos kiel ni povos, kontentigi niajn legantojn. Por komuna laboro sur kampo de lingvo internacia ni invitas ĉiujn esperantistojn, al kiuj estas nia lingvo kara.

Devo de ĉiuj esperantistoj estas ne gazet-ojn eldonadi, sed tiujn, kiuj jam ekzistas, subtenadi. Gazeto estas necesa ligilo inter esperantistoj kaj sen ĝi ni ne povus vivi. Pro tio ĝi meritas subtenon en formo morala eĉ en formo materiala. Ni esperas, ke niaj ĝisnunaj abonantoj restos al ni fidelaj kaj ke ili devove abonos nian gazeton.

La redakcio.

C.S. PREZIDANTO MASARYK PRI SOCIALISMO.

(Fragmentoj.)

Sociala problemo ne estas nur problemo de unusola klaso kaj kasto; ĝi estas problemo de ĉiuj. Doni al laboristoj ĝeneralan voĉdonrajton estas nur parta kaj negativa solvo de l' problemo. Ĝi ja devas esti solvita tute kaj pozitive: tio signifas lumigi kaj varmigi la kapojn kaj korojn de ĉiuj, tio signifas doni al la spirito la povon super la materio, tio signifas subpremi la memamon, egoismon. Sociala problemo estas problemo de moraleco-senmoraleco, problemo de perforto kaj de efika humaneco. Hodiaŭ agiĝas pri sociala programo. Sed la ĉeĥa studento kaj ĉeĥa inteligentulo tute ne povas supozi, ke li estas naskodevena instruanto de l' kamparanoj kaj de l' laboristoj — en multaj aferoj li povas kaj devas esti ilia lernanto. La laboristaro kaj la klasoj politike kaj ekonomie malplifortaj ne devas esti konsiderataj kiel nia rimedo! Oni tre erarus, se oni konsiderus nian rilaton al laboristoj nur naciece kaj politike. Nia klopodo estas morala kaj precipe morala. Ne temas pri tio, gajni la laboristojn — kiel oni kutimas paroli — por nacieca ideo, sed temas pri tio, iom post iom valorigadi en tuta socio la senton por justeco — ĉio alia alvenos mem. Rilate la riproĉon de sennacieco mi devas diri, ke mi ne unufoje konvinkiĝis, ke nia burĝa

socio estas neniom pli nacia ol la laboristoj, se ja eĉ ne malpli nacia. Tial senenhavaj estas la riproĉoj de sennacieco. Ĝis kiam nia literaturo kaj ĵurnalistiko ne zorgos pri spirita nutraĵo de la laboristaro, tiel longe ĝi ne rajtas akuzi, riproĉi la laboristaron.

Tutmonda eĉ nia situacio postulas intensajn sociajn reformojn; demokrata egaleco eliminis ĉiun ajn klasan ekspluatadon kaj regadon. Ni evitu trorapidecon; estas sufiĉe da tempo; oni ne devas havi ĉion je unu fojo. Ni komencu per tio plej bezona kaj per tio, kio ebligas kaj plifaciligas la evoluon pluan, evoluon organikan.

Ĉiu nun parolas pri socialigo. Mi jam diris, ke tiaj reformoj devas esti intensaj. Socialigo dum tute nenormala situacio, kaŭzita de longdaŭra milito estas problemo tre malfacila kaj respondecata. Eminentaj socialistaj gvidantoj kaj verkistoj konsideras ĝin dum nuna postmilita situacio neebla. Mi volas ion diri pri tio: Socialigo supozas publikan kontrolon de tuta mastrumado. Socialigo plu ne estas ebla, se la masoj de laboristoj ne ellernos kompreni tutan proceson de fabrikado kaj distribuo. Ne sufiĉas devigi per la diktaturo la tiel nomatan burĝaron al socialigo; neniam perforto estas bonfara; ne nur perforto politika, sed ankaŭ tiu ekonomia kaj sociala. La socialigo ne signifas, ke la laboristaro partoprenu nur la administradon de l' entreprenoj, sed ĝi postulas kreon de novaj entreprenoj resp. almenaŭ la perfektigon kaj celtrafan

aliformigon de l' entreprenoj kaj de tuta ekonomia praktiko kaj organizo. Por produktado estas bezona la entreprenemo, entreprenemo pozitiva, kreanta (ne spekulado kaj hiperspekulado, simptomoj de l' nenormalaj tempoj). Poste estas bezona eltrovemo, genia profituzo de l' samtempa situacio kaj kreado de novaj objektoj. Ne agiĝas nur pri la socialismo de distribuo, sed pri socialismo de produktado. Parto de nia burĝaro kompare al tiu okcidenteŭropa, suferas pro manko de l' entreprenemo. Burĝaro vere entreprenema interkonsentiĝos kun inteligenta, entreprenema laboristaro.

Problemo de socialigo postulas tre seriozan kaj sinceran pripensadon kaj bonan edukitecon de l' laboristoj eĉ kapitalistoj. Mi rigardas problemon de socialigo ne nur el vidpunkto ekonomia, sed ankaŭ morala.

Mi estis kaj estas kontraŭ interveno en Rusio kaj Hungario (skribita en letero al nacio 28. X. 1919). Ĉiu nacio dum malfacilaj krizoj devas scii mem helpi al si. Rusio travivas grandan kaj malfacilan krizon. Ĝi ne estas kaŭzita nur per la bolŝevismo, sed per centjara evoluo. Bolŝevismo de Lenin estas sekvo de carismo de Romanov-idoj. Kontraŭ rusa bolŝevismo neniel helpas al Eŭropo la militista bariero de najbaraj malgrandaj ŝtatoj; bolŝevismo devas esti superigita morale, per socialaj reformoj kaj per tuta politika eduko. Mi el tuta koro deziras al Rusio baldaŭnan resaniĝon; mi dezir

FELIETONO

A. JANALÍKOVÁ:

KELKAJ RIMARKOJ PRI ESP. MOVADO EN DANIO.

»Se vi volas ekkoni la landon de fabelo, vojaĝu al Danio«, skribas profesoro A. Kraus en sia libro pri Danio. Kaj vere ĝi faris la impreson de efektiva fabelo, kiam mi ĝin pasintan jaron komence de majo vizitis. Ĝardenoj, per kiuj estas la vilaoj de la urbo Odense (ĉefurbo de insulo Fünen) ĉirkaŭitaj, estis plenaj de plej belaj floroj, proksime de la urbo ombroplenaj fagarbaroj kaj ŝaŭmanta maro ne en tre longa distanco de ĝi. Kaj la suno brilis. Fine de junio ĝi subiris je la naŭa vespere kaj post ĝia subiro komencis la helaj, nordaj noktoj. Kaj se oni estas akceptita kaj ĉirkaŭita de bonkoraj, noblaj homoj — ĉu tio ne estas vera fabelo?

Pri bonkoreco kaj gastameco de miaj novaj geamikoj mi povus multe skribi. Estas bone

konata fakto, ke la malgranda Danio akceptis grandajn amasojn da infanoj el Germanio kaj Aŭstrio. Mi mem vojaĝis kun unu grupo da infanoj el Vieno. Estas ĝoje vidi poste, kiamaniere la danaj manĝaĵoj kaj la pura aero resanigas ilin.

Kaj pro la sama kaŭzo — resaniĝi post milita turmentado estis eĉ mi invitita al Odense. Kaj estis nur esperanto, al kiu mi dankas, ke mi povis travivi tri belajn monatojn en gastema, norda lando.

Estus eble interese scii, kiel esperanta movado estas tie disvastigita. Ne tiom, kiom en nia malgranda respubliko, precipe tiam ne, kiam mi tien venis. Nun mi kun ĝojo devas diri, ke ĝi bele kreskas dank' al persista laboro de kelkaj noblaj samideanoj, precipe dank' al laboro de mia gastiginto, s-ro N. C. Carlsen.

Kiam mi venis al Odense, mi trovis nur malmultajn samideanojn tie, kiuj flue sciis paroli esperante. Kaj baldaŭ mi havis okazon konatiĝi kun ĉiuj ĉefaj danaj esperantistoj,

as potencan Rusion, sed demokratan. Al Rusio ni povos plej bone helpi, se ni helpos al ni mem.

Socialaj reformoj — laŭ la postulo de pripensita kaj science motivigita programo de socialigo — postulas la laboremon de ĉiuj, ĉie, en ĉiu direkto. Tio signifas la senton de l' devo de ĉiutaga regula t. n. eta laboro. Estas necese pli precize ol ĝis nun studi kaj analizi la problemon de socialigo. Ne plaĉas al mi, ke multnombraj ĝiaj anoj eĉ kontraŭuloj scias nenion ol la devizon. Precipe oni ne devas al laboristoj tiel multe promesadi; estas dubinde, ĉu la laboristoj, dum komencaj stadioj de socialigo, fartus pli bone ol dum kapitalista reĝimo. La socialigo postulas oferojn ne nur de l' kapitalistoj, sed ankaŭ de l' laboristoj; ja temas pri grandioza principo, pri renverso epoka, kies eblecon kaj bezonon ne povas decidi provizora profito, eĉ eble profito de ĉiuj.

Evoluo de moderna nacieco kreskis paralele kun tiu de internacieco. Kiel Dostojevskij bele montris, la homo ne posedas nur la amon por sia nacio, sed samtempe sopiron rilati kun nacioj aliaj kaj sopiron por tuthomara konkordigo. Lia politiko vere nacia ne estas politiko ŝovinista. — Ŝovinismo estas ĉie kaj ĉiam blinda. Mi ja ankaŭ scias, ke ekzistas ankaŭ ŝovinismo de l' internacieco, tiu kosmopolitismo, malŝatanta la naciojn malgrandajn kaj nekomprenanta, ke la ĝusta, vera inter-

nacieco ne estas kontraŭnacia eĉ sennacia. Pura humaneco povas reflekti nur en nacieco.

oooo

Tradukis F. Ŝ.

B. BEČVÁŘOVÁ:

SENKOMPATA . . .

Krepuskiĝis. »Pluvos«, diris al si maljuna fiŝgardisto Věchet (elp. Vjeĥet), rigardante la sangoruĝan firmamenton. La tuta okcidento similis brilegantan rubenon. Sur la tero kuŝis ĝia mirinda rebrilo. Ĝi aspektis, kvazaŭ la tero estus trafita de granda fajro. Sur la kampoj de la vasta Blata*) ebenaĵo brulis displugita argilo kiel bruliĝanta cindro. La laĝetaro brilis kiel speguloj, en kiuj speguliĝis fajroruĝa ĉielo kaj la krudaj korpoj de l' arboj kaj la nuda arbeto, kvazaŭ la tuta ĉirkaŭaĵo droniĝus en sango.

Sangis ankaŭ la defalita foliaro en apudstrataj fosaĵoj kaj ruĝiĝis la tegmentoj de la proksima urbeto. Per fajra ruĝo brilis fenestroj de la fabela kastelo, supre post la urbeto majeste altiĝanta. La kastelaj fenestroj sputis blindigajn fajrerojn. — La malnova legendo rakontas, ke la sangoruĝa vespero antaŭsignas iun malĝojigan okazintaĵon. Ies koro droniĝus en sango — —

*) Blata estas fruktodona kampa ebenaĵo en suda Bohemio. Ĉi tiu kamparo estas interesa pro tio, ke sep vilaĝoj procesis pro ĉi tiu ebenaĵo kun najbara nobelaro preskaŭ kvin cent jarojn. Antaŭ kelkaj jaroj ĝi estis finita por la bono de l' sep menciitaj vilaĝoj.

Ĉar dum pentekosto estis en Odense ilia landa jarkunveno. Kvankam la vetero estis beleĝa, venis nur ĉirkaŭ 25 samideanoj kaj inter ili estis l' Anglo, l' Svedo kaj mi, bohemino. Kun ĝojo mi rekonis f-inon A. Rybs, vicinspektorinon el Kopenhago, kun kiu mi konatiĝis en Paris (1914). Dum belega mateno ni iris belan promenadon per du veturiloj al ombroplena fagarbaro kun granda blua lago. Vespere estis festena vespermanĝo. Ambaŭ laborkunsidoj estis bedaŭrinde por ni tri fremduloj neinteresaj, ĉar oni traktis preskaŭ sendese nur en dana lingvo.

La jarkunveno de danaj esperantistoj instigis s-ron N. C. Carlsen al vigla kaj senlaca laboro. Inter siaj multaj konatuloj li laboris por gajni ilin por nia ideo. Kaj lia laboro havis bonajn rezultatojn. Baldaŭ li malfermis esp. kurson kun 20 partoprenantoj, de kies 17 veturis poste al Dresden kaj Praha. Ili bone povis vidi, kiel facile mi interkompreniĝas kun s-ro Carlsen kaj ne dubis plu pri milico de esperanto. Mi mem vizitis la kurson

kaj kelkfoje eĉ helpis iomete al mia gastiganto en lia laboro.

Ĉar mi volis ekkoni eĉ aliajn regionojn de Danio mi vizitis dum 2 semajnoj Judlandon, kien mi estis invitita de aliaj samideanoj. La plej grandan urbon de duoninsulo, Aarhus, mi vizitis antaŭe, kie nur kelke da paŝoj de marbordo mi pasigis kelkajn neforgeseblajn tagojn eĉ delegito de U. E. A., s-ro Hvorslev, kiu jam dum longa tempo interesiĝis pri nia nacio, skribante artikolojn en danajn gazetojn pri ni laŭ sciigoj, gajnitaj per esperanto. En decembro 1921 li havis paroladon pri nia nacio kaj lando laŭ sia propra vojaĝo al Praha kaj laŭ sciigoj, kiujn mi sendis antaŭ nelonge al li. Poste mi vizitis malgrandan urbon Grenaa, estante gasto de s-ino Mammen, konata pro sia helpo al germanaj infanoj kaj al skoltoj. Kun tiu »skolta patrino« mi veturis eĉ en Skanderborg, kie mi inter iliaj kursanoj paroladis pri nia nacio kaj ĝia suferado antaŭkaj dummilita. Kiel bone estis en la ondoj de Kattegat, dum la suno brilis, kaj kiel bonajn

La dometo de fiŝgardisto Vjehet troviĝis ekstere en la kamparo, malantaŭ la ĉaskastelo inter la multenombraj lagoj. Geedzoj Vjehet vivis tie vivon de l' du ermituloj. Ili havis nur unu filon, kiun ili donis studadi. — La filo posedis eksterordinaran kapablon por la studado. Post ĝia finiĝo, li venis Vienon, kie li fariĝis »granda sinjoro«. La geedzoj Vjehet povus nur ĝoji pro tio. Precipe ŝi, tiu severa sudboheminano nubvizaĝa, forta, firma en ĉiu sia decido, pro tio ankaŭ tre energia. Ŝi estis honeste fiera, serioza, laborema virino de l' popolo.

La filo heredis ŝian karakteron. Li volis fariĝi »granda sinjoro«, superigi siajn samagulojn, sian studentan kolegaron, sed la nobla fiereco de sia patrino renversiĝis je fiereco malnobla. Li estis deveninta de la malriĉeco kaj fariĝis potenculo. La unuaj, kiuj estis tion eksentotaj, estis la propraj gepatroj, sed plej multe la patrino. Kiam li ne estis ankoraŭ sendependa, la patrino lin ofte kaj iam eĉ tre severe punadis, admonante lin senĉese. Montriĝis ĉe li multe da malbonaj ecoj, kiujn oni ofte vidas ĉe la infanoj, kiuj havas severan patrinon kaj senenergian patron.

La infanoj de tiaj gepatroj ne respektas patron, ne amas patrinon. Tia infano edukas sin mem. Iam ĝi edukas sin bone, iam ĝi estas venkata de la malbonaj ekzemploj.

La filo de fiŝgardisto montris malbonajn inklinojn. La patron li ignoris, la patrinon li ne amis. Li respektis kaj timis

amikojn mi ĉie trovis inter la esperantistoj! Ankoraŭ kelkajn tagojn mi travivis en bela urbo Kolding ĉe s-ro Zoffmann, kiu antaŭ la milito estis nia gasto kaj post tio mi revenis denove al Odense. La ĉefurbon de Danio mi vizitis jam en la jaro 1906.

Antaŭ la milito la danaj samideanoj havis sian propran esp. gazeton, kiu poste ĉesis aperi kaj la esp. movado malrapide ekdormetadis, sed nun ĝi vekigis el sia dormado kaj komencas bele ekflori. Esp. mondkongreson en Praha vizitis 45 danaj samideanoj kaj ili propraokule konvinkigis pri utileco de nia kara lingvo.

Laŭ la dane presita »Esp. folieto«, kiun mi antaŭ kelkaj tagoj de Odense ricevis kaj kiun mi per helpo de vortaro tradukis, oni aranĝas vicon da esp. kursoj, sukcesplenajn paroladojn pri utileco de esperanto, oni gajnis la Ruĝan Krucon por sia celo — ĉie oni vigle laboras.

Pro tiu fakto mi plenkore ĝojas kaj deziras al karaj danaj pioniroj multe da sukceso en ilia meritplena laboro.

ŝin nur tiam, kiam li ankoraŭ dependis de la patro. Sed tuj, kiam li liberiĝis de li, li ĉesis skribi al la gepatroj. — Tio okazis antaŭ dek aŭ dekdu jaroj. La maljuna fiŝgardisto havis multe da zorgoj, kiel fartas al la filo, ĉu nenio malbona trafis lin. La patrino okulvide konsumiĝadis pro tio, sed ŝi neniam parolis eĉ unu vorteton pri li. La konatuloj, kiuj estis revenintaj el Vieno, flustris al si en la orelojn, ke la »fileto« scias bone gajni monon, sed same bone li scias ĝin elspezi. La patrino opiniis, ke la filo nur tial ne skribas, por ke li evitu la gepatrajn riproĉojn! Ŝi estis tute senkonsila, nesciante vere, kion fari. Ŝi sentis sin tre ofendita pro tio, ke la filo ŝiajn leterojn ne respondas, sed la patrino amo kaj zorgemo devigis ŝin veturi Vienon, por viziti la filon, admoni lin, por ke li ne elspezu senutile la monon, ke li ne forgesu sian bonkoran, maljunan patron, pro kiu eĉ ŝia koro iam ekdoloras, vidante lin pro timo tremantan.

La maljunulo iradis kvazaŭ korpo sen animo. Senĉese li forviŝadis siajn okulojn kaj la nazon.

La amo patrina, kaj sento edzina venkis ŝian fierecon. La patrino ekveturis serĉi sian perditan filon. Ŝi vizitos kaj petos lin, ke li ne forgesu maljunajn gepatrojn. La patrino konsciigis ja, ke ne eble estas lin riproĉi sammaniere, kiel ŝi estis tion iam farinta, kiam la filo estis ankoraŭ malgranda studento; ĵus pro tio, ke ŝi estis kiel patrino fiera, ŝi komprenis bone, ke la sendependa filo, eble »granda sinjoro«, posedas ankaŭ sian fierecon kaj ke ŝi devas lin trakti tute alie, ol li efektive meritis. Do ŝi vizitos lin kiel zorgema patrino, kiu havas je sia sola, plej amata infano, mortigan timon. Ŝi memoras lian patron, tiu bonulo faris do al li neniam iun malbonaĵon. Kaj ŝi, patrino, per sia severa edukado havis do la plej bonajn intencojn. La filo devas tion ja mem konfesi. —

Ŝi alvenis Vienon, elserĉis filon, atendis lin en la antaŭĉambro, ĝis kiam la servisto anoncis ŝian viziton. La koro tremetis en la brusto kaj ŝi donis al si demandon, kiamaniere la filo senkulpigos sin? Plej volonte ŝi ekkaptus tiun fieran belan kapon, superŝutus ĝin per miloj da kisoj. — Ŝi ne vidis lin plenajn du jarojn — sed estas necese konservi al si patrinan reputacion. Vizitante lin en Vieno, per tio ŝi faris ja multe por li. Ŝi rigardis ĉirkaŭ si kaj embaraseme ŝi staris alterne levante piedojn. Tiom da luksego ĉie ĉirkaŭ! Aŭdiĝis paŝoj. Filo! — Ŝi retenis la spiradon... Ne, tio ne estis la filo, tio estas

revenanta servisto, kiu certe kondukos ŝin al la sinjoro. Nu, sinjorajn morojn oni devas kompreni. (Daŭrigota.)

INDUSTRIO EN LA ĈEĤOSLOVAKA RESPUBLIKO.

(Fragmento el la presota angla originalo »The Czechoslovak Republic«, 2-a eldono, verkita de Fr. Pokorný kaj P. Selver sub la direkto de Jar. Cisař. Tradukis Vinc. Kroužil.)

Ĉeĥoslovaka industrio povas esti dividita en **tri grupojn**.

1-a grupo enhavas la industriojn, havigantaj siajn krudmaterialojn en la respubliko mem. Al tiuj ĉi industrioj estas kalkulataj tiuj agrikulturaj, nome: suker-, alkohol-, bier-, malt-, amelindustrio kaj aliaj, plie porcelan- kaj lignoindustrio.

2-a grupo entenas industriojn, havigantaj al si sole parton da hejmaj krudmaterialoj. Al tiaj apartenas industrioj, produktantaj ŝtalon, feron, la granda nombro da metalindustrioj, poste ĥemi- kaj ledindustrio.

3-a grupo konsistas el la industrioj, importantaj ĉiujn siajn krudmaterialojn. Tio estas teksindustrio, fosfatindustrio kaj diversaj metalindustrioj kiel kupro- kaj nikelindustrio.

La financa statistiko pri tiuj ĉi tri grupoj estas jena:

	Valoro de importaĵoj	Valoro de eksportaĵoj
1-a grupo	21 mil. da Kĉ	713 mil. da Kĉ
2-a grupo	538 mil. da Kĉ	1079 mil. da Kĉ
3-a grupo	453 mil. da Kĉ	905 mil. da Kĉ
Entute	1012 mil. da Kĉ	2697 mil. da Kĉ

La landoj, kies eksporto superis tiun de Ĉeĥoslovakio estas sole Granda Britujo, Usono, Germanujo, Francujo kaj Rusujo.

La jena statistiko montras per la procentoj, kiumezure antaŭ la mondmilito la ĉeĥoslovakaj teritorioj kontribuis al la industria produktado **en la estinta Aŭstrio-Hungarujo**:

1. Sukero	92%
2. Alkoholo	46%
3. Biero	57%
4. Malto	87%
5. Nutraĵoj	50%
6. Ĥemiproduktaĵoj	75%
7. Metaloj	60%
8. Porcelano	100%
9. Vitro	92%
10. Teksaĵoj: a) el kotono	75%
b) el lano	80%
c) el juto	90%
11. Ledo	70%
12. Gantoj	90%
13. Piedvesto	75%
14. Papero	65%

*) Se la cirkonstancoj permesos, tiu ĉi verko estos esperantigita.

La tuta produkto kaj eksporto (dum la jaro 1912—1913).

1-a grupo.

a) Agrikultura industrio.

	Produkto tunoj	Eksporto tunoj	Eksportvaloro mil. da K
Sukero	1,470.000	860.000	180
Alkoholo	200.000	35.000	50
Biero	1,300.000	120.000	24
Malto	500.000	190.000	61
Lupolo	11.500	6.000	24
Amelo	—	23.000	10
Entute			349 milionoj da kronoj

b) Lignoindustrio.

	Produkto tunoj	Eksporto tunoj	Eksportvaloro mil. da K
Ligno por konstruaĵoj	12,500.000	1.500.000	108
Mehlaro	—	—	30
Lignaĵoj	—	—	20
Entute			158 milionoj da kronoj

c) Nutraĵoj.

	Eksporto tunoj	Eksportvaloro mil. da K
Peklita viando	430.000	90
Sukeraĵoj	—	—
Konservofruktoj, konfitaĵoj	—	10
Entute		100 mil. da K

d) Porcelano, fajenco ktp.

	Produkto tunoj	Eksporto tunoj	Eksportvaloro mil. da K
Porcelano	30.000	17.500	14
Kaolino	330.000	200.000	14
Pavimmaterialoj	126.000	94.000	68
Fajrargilo	296.000	114.000	10
Entute			106 milionoj da kronoj
Eksportvaloro de 1-a grupo entute			713 milionoj da K.

2-a grupo.

a) Ĥemiindustrio.

	tunoj	Eksporto tunoj	milionoj da K
Importo de krudmaterialoj	327.580	500.000	230

b) Ledindustrio.

	tunoj	Eksporto tunoj	milionoj da K
Krudledo	45.000	25	250 mil. da K
„Quebracho“-ekstrakto	20.000	Gantoj 700.000	dekduoj da paroĵ 20 mil. da K

c) Metalindustrio.			
Maŝn-kaj metalkomercaĵoj.			
	tunoj	tuoj	
Metaloj	85.248	100.000	300 mil. da K
Fero-, stano-, kaj zink-minaĵoj	15.000	Motorĉaroj 1.500	} 70 " " "
Svedaferominaĝo	600.000	Plugiloj 100	
		Agrikulturmaŝinoj	56 " " "
		Fero-kaj ŝtalproduktaĵoj	86 " " "
		600.000 tunoj	67 " " "
		Emajlokomercaĵoj	
		45.000 tunoj	
Eksporthavaro de la 2-a grupo entute 1.079 mil. da K			

3-a grupo.

	tunoj	Pretaj prod.	tunoj	
Kotono	192.000	60.000	400 mil. da K	
Lano	36.000	40.000	375 " " "	
Tolo	30.000	" "	16 000	105 " " "
Juto	36.000	" "	25 000	25 " " "
Eksporthavaro de la 3-a grupo entute				905 mil. da K



AL S-O ELLERSIEK EN BERLIN.

Samideano, kiu ne partoprenis la XIII-an kongreson kaj legis raportojn pri ĝi nur en via gazeto »Esperanto Praktiko«, devas esti konvinkita, ke la kongreso malsukcesis, ke Ĉeĥoslovakoj estas tute malspertaj homoj, ke ili estas ekspluatistoj k. t. p. Ĉiu serioza observanto scias, ke tiel grandaj entreprenoj ne estas ĉiam sendifektaj, kaj objektivan kritikon ĉiu aprobas, sed vi skribas ofte false kaj tiel malice, por ke viaj legantoj rigardu ĉeĥoslovakon nacion malfavore.

La vojaĝo de kongresanoj tra Germanio kaj la Dresdena antaŭkongreso ankaŭ ne estis sendifektaj, ĉar »Belga Esperantisto«, vere objektiva gazeto, skribas pri ili en n-o 7—8:

»Je la tria matene ni atingis Hanovron, kie atendis nin vagonaro al Leipzig. Ĉi tiu tamen jam estis tiel superplena je samideanoj holandaj, skandinavaj kaj anglaj, ke ni antaŭvidis kun teruro la eblecon de seshora starado, malgraŭ la fakto, ke kelkaj unuaklasaj lokoj estis neokupataj. La kontrolisto ne permesis al ni uzi tiujn lokojn, dirante, ke li ne povas transklasiĝi la vojaĝantojn, kvankam li bonkore konsentis, ke ni fakte nun estis »transklasiĝitaj« en malpli ol kvara klaso. Administracio estas tutmonda malsano! Post kvar horoj ni feliĉe kaptis lokon, kiun ni kvarope, laŭvice okupis«. (paĝo 109.)

Plue ni legas:

»Parolis anoj de multaj reprezentataj nacioj, kies parolojn bedaŭrinde mi ne

povis kapti precipe pro la vera apatia stato, en kiu igis min la premanta atmosfero de la salono. Dum tiu sama kunveno s-ro Ledermann el Nürnberg faris propagandan paroladon en **germana** lingvo. Ĉe estis granda nombro da **ne-esperantistoj**. (paĝo 110).

»Reveturante ni haltis en Blasewitz, antaŭ la »Vaporŝip-hotelo«, kie la kelneroj ŝajnis atendi nin, kaj kie la tabloj pretigitaj en la ĝardeno ŝajnis deziri al ni bonan apetiton. Ĉiuj serĉis kiel eble plej freŝan lokon kaj atendis la okazintaĵojn, kiuj bedaŭrinde ne respondis je la atendo. La kelneroj kvazaŭ timis alporti la manĝaĵojn, kiuj, laŭ tio, kion oni rakontis, estis preparitaj por la antaŭa tago. La kongresanoj sufiĉe laŭte protestis... repostulis monon, kiun ili cetere ne ricevis. Kiam oni sciis la klarigon pri la afero: malbona kompreno inter la organiza komitato kaj la hotelestro, ĉiuj iom post ion trankviliĝis kaj eĉ bonkore ridis pri la aventuro«. (paĝo 110 kaj 111).

Grandioza organizo en via lando, ĉu ne vere, s-o Ellersiek? Ankoraŭ unu parton de tiu raporto ni devas citi:

»La sekvantan tagon ni pretigis nin por veturi per speciala vagonaro al la urbo de la XIII-a, al Praha. La lastaj kongresanoj prizorgis en la akceptejo ŝanĝon de mono, forsendis siajn lastajn poŝtaĵojn en Dresdeno kaj reprenis sian deponitan pasporton. Dum tiu lasta faro ni havis la okazon sperti, ke tiu, kiu agis laŭ la informoj de la komitato: »antaŭe peti restadpermeson de la ĉefpolicejo«, devis pagi Mk 210.—, kaj tiu, kiu tutsimple nenion petis, nur Mk 10.—. Vere neniel kuraĝige! Konfesinde estis tamen la fakto, ke la malfeliĉaj obeintoj trovis en tiu afero grandan helpemon de la loka deĵoranta policano esperantista, kiu klopodis kiel eble plej, sed parte vane, por reordigi ĉion«. (paĝo 111).

Do ĉi tie la belga raportisto riproĉas mankojn de germana organizo, sed komparu tion kun viaj riproĉoj. Diferenco estas tia, ke belga raportisto skribis objektive, sed vi tute antaŭjuĝeme. Kaj kaŭzo de tio? Vi, s-o Ellersiek, intencis printempe antaŭ la XIII-a fortimigi multajn, ke ili ne aliĝu al la kongreso en ĉeĥoslovaka ĉefurbo, sed vi ne sukcesis. Tiakauze vi devis nian grandiozan feston iamaniere abomenigi kaj pri tio vi ankaŭ dum la kongreso ĉie sufiĉe penis, kiel povas atesti unu samideano el Plzeň, kiu aŭskultis vian polemikon en aŭtobuso en Blansko (vi tion ankaŭ aludas en via raporto). Tiu samideano rakontas:

»Kiam la kondukisto postulis takson por veturo Kĉ 10.—, tuj du s-oj (verŝajne Ellersiek kaj Jost) komencis ataki Kongresan Komitaton kaj unu el ili diris: »Tuta kongreso estas trompaĵo de Ĉeĥoj. Ĉie ili volas elsuĉi monon de kongresanoj«. Iu alia samideano defendis Kongresan Komitaton dirante, ke ĉiu, kiu ne volas, ne devas pagi, ĉar tiun vojon oni povas fari piede. (Kaj efektive multaj kongresanoj marŝis piede.) Unu el nomitaj s-oj multe »blasfemis« kaj favoris aliajn kongresojn, kiuj laŭdire estis pli grandaj ol XIII-a kaj funkciis precize. Estinte demandita, kie estis pli granda kongreso, li respondis, ke en Dresden. La defendinto ĝuste rediris, ke en Dresden estis sole 1500 da kongresanoj, sed en Praha estas 2500, kaj ke en Germanio oni ankaŭ nenion donas senpage, ĉar li devis jam antaŭ la milito pagi por veturo per aŭtomobilo en Berlin (Käses Aŭtomobil-Rundsfahrt) 2 aŭ 3 markojn. Neniu minacis al iu per bato, kiel s-o Ellersiek skribas«.

Al aliaj ne plej ĝentilaj frazoj en viaj raportoj ni ne respondas, ĉar ni supozas, ke ĉiuj samideanoj mem ĝuste ilin kritikos, eĉ ne aŭdinte alian partion.

La eldonantaro de »La Progreso«.

Wien, en decembro 1921.

KOLEGOJ! KURACISTOJ!

Kiam post la katastrofo de Aŭstrujo la terura misero trafis ankaŭ la labormalpovajn anojn de la kuracistaro kaj la vidvinojn kaj orfojn de kuracistoj, tiam la »**Kuracista Kamero**« en Wien (Vieno), kune kun la ĉefaj profesiaj korporacioj instalas antaŭ proksimume du jaroj, komitaton celantan la mildigon de la neeldirebla granda misero en la rondo de samprofesianoj.

Dank al la riĉa helpo de amikoj kaj kunstemaj kolegoj de l' en-kaj eksterlando povis la komitato ĝis nun havigi al multe pli ol 2000 familioj kaj mastrumoj kontentigan helpon per donado de sufiĉe grandaj monsumoj, vestaĵoj, tolaĵo kaj nutraĵoj, per enloĝigo de infanoj kaj malsanuloj en refortigejoj; ĝi povis tiamaniere helpi ilin el la plej granda zorgosavi multajn ekzistojn, ree laborpovigi malsanulojn kaj ebligi la vivtenadon kaj edukadon de infanoj.

La espero, ke la unua alvoko, kiun la »Centra-Helpkomitato por kuracistoj en Aŭstrujo« direktis al la oferemo de kolegoj, estos ankaŭ la lasta, montris sin bedaŭre iluzia, ĉar sekve de la plue daŭranta ekonomia krizo kaj la netolerebla situacio, en kiu Aŭstrujo troviĝas, la mizeriĝo atingis tian gradon, ke por labormalpovaj aŭ duonlaborpovaj la alsimemhelpo nuntempe ne estas ebla, eĉ ne per streĉo de ĉiuj siaj fortoj. Kiel povu sufiĉi por pensionulo en alta aĝo, aŭ al infanoriĉa familio, kies nutrinto estas forrabita de l' morto, la poŝara enspezo

da 600—2400 aŭstria kronoj — do proksimume 1—1½ svisaj frankoj — por vivado dum 12 monatoj? La misero estas tro terurega por ĝin priskribi; ĝi ne egalas en la historio trovas.

Ni sentas ĝin tre humiliga, ke ni devas direkti nin refoje al la amikaj kolegoj en la en-kaj eksterlando kun korega kaj urĝa peto por helpo.

La aŭstrujaj kuracistoj, kiuj sin jam akomodis al la situacio kaj povis retrovi la ekonomian ekvilibron, faras ja ĉion por tributi kontraŭ ĉi tiu misero, sed nek nia forto, nek nia havo sufiĉas, por forigi la ekonomian katastrofon de la labormalpovuloj.

Pro tio ni devas malgraŭ la humiliga sento refoje voki por helpado:

Helpu nin, helpu nin, ŝirmi kontraŭ pereoj la labormalpovajn samprofesianojn kaj la vidvinojn kaj orfojn de kuracistoj!

Por la Centra-Helpkomitato
de Kuracistoj en Aŭstrujo:

La prezidanto: La administrjestro:
Prof. A. Eiselberg m. p. D-ro Thenon m. p.

Monsendojn bonvolu adresi al: »Zentral-Hilfskomité der Ärzte Österreichs«, Wien I., Börsengasse 1 (Austria). Bonvolu sendi monon nur en propra nacia valuto.

DIVERSAĴOJ

La tria komitata kunveno de Ĉsl. Asocio Esperantista en Praha la 12. XII. 1921. Partoprenis: S-roj Eiselt, Kraus, Novák, Pitlík, Hromada; f-inoj: Šupichová kaj Vlčeková, kiu protokolis. Leterojn sendis: D-ro Kamarýt, Bratislava; Berger, Moravany; E. Klubo, Plzeň; Sklenčka, Hradec Králové; Kejzlarová, Červený Kostelec; Kroužil, Brno. Daŭro de 20 h, 30 m ĝis 23 h, 30 m. Protokolo de la dua kunveno estis aprobita. F-ino Šupichová ricevis permeson de la ministerio por instruado aranĝi en Praha kurson por instruistoj, ĝi okazos en januaro. Ĝ. sekretario Hromada raportas: pro lia malsano iom prokrastigis la dissendo de la protokolo. Ĝia speciala represo el Ĉ. G. estis sendita al ĉiuj kluboj, kun aldonado al tiu protokolo. Preskaŭ ĉiuj kluboj respondis la demandilojn, pri parolado kaj kursoj post la XIIIa. La materialon oni uzos prese. D-ro Kamarýt skribas, ke esperantistoj en Slovakio ne rekomendas Pišťany kiel kongresurhon proponante Brno aŭ Olomouc. S-ro inĝ. Scholze, prez. de Germana Ligo Esp. konsentas kun kongreso de ĉiuj esp. en Ĉsl. 1922 en Olomouc. Oficialan sciigon li sendos post la estrara kunveno de G. L. E. Por pedagogia konferenco en Genevo, aprilo 1922, d-ro Kamarýt estas nomita oficiala delegito de Ĉ. A. E. Unua flugfolio pri Esp-o estas ĵus eldonita de Ĉeĥoslovaka Gazeto. Prezo 100 ekz. 10 Kĉ, 1000 ekz. 80 Kĉ. Kelkaj kluboj jam mendis. Estas aprobita fondo de Propaganda sekcio de Asocio kaj pago de ĝiaj ĝisnunaj elspezoj. D-ro Kamarýt sendis manuskripton de la ekzamena regularo, kiun Asocio eldonos post interkonsento de s-ro Eiselt kun d-ro Kamarýt pri certaj detaloj. Plue d-ro K. sendis manuskripton de memorandumo pri stato de internaci-

lingva problemo; oni ĝin presigos. Laŭ deziro de la oka laborkunsido en Chrudim Ĉ. A. E. sendos proteston kontraŭ la ŝovinistaj malverajoj de s-ro Ellersiek en E. Praktiko. Estis akceptita la propono de s-ro Skleněka, ke Ĉ. A. E. aliĝu al la ĉsl. societo de Ligo de Nacioj. Ĉ. A. E. eldonos flugfoliojn koncerne spertoj pri Esperanto en lernejoj (laŭ la brita broŝureto). Akceptita estis propono de f-ino Vlčková pri fondo de Komisiono registrona tradukojn el la ĉeĥa literaturo. Por eviti duoblajn tradukojn de la sama verko, la ĉefaj tradukantoj estas petataj informi la komisionon (M. Lukáš kaj V. Čánský) pri tio, kion ili tradukis aŭ intencas traduki. La komisiono informos ilin, ĉu la verko ne estas jam tradukita. B. V.

En Domažlice gvidas kurson s-o Em. Kubásek, membro de Esp. Klubo en Plzeň. Partoprenas ĝin 24 personoj.

Faka kunveno de arĥitektoj kaj inĝenieroj dum la XIIIa Universala Kongreso de Esperanto en Praha. Ĉeestis 15 kolegoj. Estis elektita: prezidanto s-ro inĝ. V. Kroužil, Brno, sekretario s-ro E. Vrbata, Praha. En la nomo de la Societo de ĉeĥoslovakaj arĥitektoj kaj inĝenieroj grupo Praha s-ro E. Vrbata salutas plej kore la kunvenintaron kaj deziras al ĝi plenan sukceson. La Societo de ĉeĥoslovakaj arĥitektoj kaj inĝenieroj grupo Praha tre bedaŭras, ke ĝi maltrude eksciis la fiksitajn tempojn de la hodiaŭa kunveno kaj ke ĝi pro tio ne povis pli nombre ĝin partopreni kaj la restadon de la tre estimataj kolegoj en nia ĉefurbo pliagrabli. Nia maljuna ĉefurbo prezentas precipe por la arĥitektoj multajn rimarkindajn arĥitekturajn objektojn, ĉefe el la mezepoko; tial ni vin petas, estimataj sinjoroj, dediĉi al ili vian afablan atenton! La Societo de Ĉs. Arĥ. kaj Inĝ. grupo P. en sia kunsido kune kun la reprezentantoj de la Societo de Amikoj de la Laborakademio de Masaryk kaj de la Teknika Muzeo pritraktis la demandon de Esperanto kaj decidis la jenan rezolucion: »La Societo de ĉeĥoslovakaj arĥitektoj kaj inĝenieroj grupo Praha rekonas la grandan profiton, kiu povus rezulti de la enkonduko de internacia lingvo Esperanto por la evoluo kaj organizo de la teknika kaj spirita kulturo; pro tio ĝi volonte partoprenos la klopodojn celantaj la enkondukon de Esperanto en lernejojn kaj internaciaj rilatoj kaj esprimataj per la rezolucio de la reprezentantoj de 11 popoloj en la Ligo de Nacioj (subskribita ankaŭ de ĉs. ministro por eksterlandaj aferoj D-ro Beneš), per la voĉdono de anglaj inĝenieroj, per la rezolucio de 21 Akademianoj francaj; per la rezolucio de inĝenieroj ŝtataj kaj urbaj en Paris; per la rezolucio de la Societoj de Ruĝa Kruco; per la rezolucio de Komerca Ĉambro franca, k. t. p. Samtempe la Societo de Ĉs. Arĥ. kaj Inĝ. grupo P. esprimas deziron, ke la Respubliko Ĉeĥoslovaka per la enkonduko de Esperanto en ĉiujn siajn lernejojn realigu unu el la ĉefaj kaj fundamentaj postuloj de la programo de la instruisto de nacioj Komenius, necesa por la organizo de ĉiu homaro«. (Entuziasma aplaŭdo.) S-ro inĝ. Ch. Tiard el Parizo sciigis laborplanon por la verkado de teknika vortaro

pri publiklaboroj (vojoj, pontoj ktp.) kaj konforme al la deziresprimoj voĉdonitaj de la Ĝenerala Asocio de la Francaj Ŝtataj Inĝenieroj de la Publiklaboroj kaj Societo de la Urbaj Inĝenieroj en Paris proponas la jenan labormetodon: 1. Ĉiu kunlaboranto havigos la seslingvan teknikan vortaron de Schlömann, volumoj 8a kaj 13a, eldonitaj en München kaj Berlin. 2. Oni dispartigos la laboron laŭ la nombro de la kunlaborantoj. Ĉiu el ili tradukos esperanten la vortojn entenantajn en la paĝoj al li aljuĝitaj, montrante ĉiun vorton per ĝiaj paĝa kaj propra numeroj (laŭ la disdonita specimeno). 3. Je la fino de periodoj, kies daŭro estos antaŭfiksita de la kunsidantoj en Praha, ĉiu kunlaboranto sendos sian manuskripton al la kolego lin sekvanta sur la listo. Tiamaniere la verkoparto de ĉiu el ni rondiros laŭ antaŭdifinita vojo kaj estos laŭvice reparata de ĉiuj aliaj kunlaborantoj. 4. Fine, ĉiuj kajeroj estos centralizitaj de komisiono starigita dum la kongreso. Tiu komisiono elektos la definitivajn esperantajn vortojn, laŭ la indikoj de plejmulto, kaj proponos novan esploron pri la dubaj vortoj. 5. Kiam la tuta laboro estos finita, tiam oni povos ĉu peti diverslandajn eldonistojn, ke ili faru prezponojn por presado ĉu interkonsenti kun eldonisto de la vortaroj Schlömann por eldono de komplementa libreto en Esperanto. Por la kunlaboro de la vortaro pri la supre dirita fako anoncis sin s-roj: **Francoj**: Inĝ. Ch. Tiard, Paris; Inĝ. Basset, L'Hajj les roses Seine; Arĥ. P. Hulme, Vienne-Isère. **Germanoj**: Inĝ. Kand. F. Schneidr, Praha; **Danoj**: Inĝ. A. Taŭmose, Kobenhavn; **Ĉeĥoj**: Inĝ. E. Vrbata, Praha, Inĝ. V. Kroužil, Brno. — Ĉar la nombro de la naciaj lingvoj de tiuj ĉi anoncintoj ne estas sufiĉa, tial s-ro Tiard provos varbi pluajn kunlaborantojn skribe. Post la diskuto de diversaj opinioj pri la instruado de Esperanto en la politeknikaj lernejoj estis akceptita la propono de s-ro Tiard, ke esperantistoj de iuj nacioj prizorgu mem tiun ĉi aferon laŭ la ĉirkonstancoj de iliaj landoj. Je la fino la prezidanto atentigas pri la grava eltrovaĵo de inĝ. Riegr, profesoro ĉe la Alta politeknika lernejo en Brno, nome pri Logaritma Kalkulilo por armbetonaj konstruoj, montrante la Kalkulilon kaj la esperantan priskribon pri ĝia uzo. La Kalkulilo, signifanta grandan ŝparon de energio dum la kalkulado, vekis grandan intereson. La kunvenon ĉeestis ankaŭ s-ro inĝ. Labler, ministeria konsilanto, vicprezidanto de la Societo de Ĉs. Arĥ. kaj Inĝ. grupo P., kiu (kvankam neesperantisto) promesis ĉiun ajn subtenon por la afero de Esperanto. Inĝ. V. Kroužil, prezidanto. Inĝ. E. Vrbata, sekretario. Praha, 2. aŭgusto 1921.

Al raporto pri la I-a regiona kunveno de okcidentbohemiaj esperantistoj ni aldonas: La kunvenon partoprenis tre multaj samideanoj el diversaj subenomitaj lokoj. Kiel prezidanto estis elektita s-o inĝ. Rud. Novák, kiel vicprezidanto s-o Jos. Přibáň kaj kiel protokolisto s-o Fr. Hahn. So Pitlík el Praha raportis pri esperantista movado, precipe pri organizado de regionaj kunvenoj, pri la XIII-a kongreso kaj pri idista movado. Post ĉiu raporto

disvolvigiĝis vigla diskuto, kiun partoprenis multaj ĉeestantoj. En liberaj proponoj oni precipe parolis pri »La Progreso« kaj pri Ĉ. A. E. Poste estis akceptita jena rezolucio:

Rezolucio.

Esperantistoj el okcidenta Bohemio (el Plzeň, Škvřňany, Letná, Doubravka, Újezd, Doudlevice, Štáhlavy, Nýřany, Staňkov, Stodo, Domažlice, Stupno), aŭskultinte raportojn pri esperantista movado ĝenerale kaj en Ĉeĥoslovaka respubliko speciale, faris en sia unua kunveno, okazinta la 18-an de decembro 1921 en Plzeň, tiun ĉi decidon: 1. Por ke niaj interrilatoj pli-firmigiu, ni konsentas pri opinio de centro Ĉ. A. E., ke niaj organizaĵoj en okcidenta Bohemio aranĝu simile kiel organizacioj orientbohemiaj, regule kvaronjare regionajn laborkunvenojn. Pri ilia aranĝo zorgos sep-membra komitato. 2. Estas necese, ke nia centro Ĉ. A. E. zorgu egale pri ĉiuj regionoj, por ke ankaŭ regiono okcidentbohema estu pri ĉio grava informita. — 3. Ni rekomendas daŭrigi eldonadon de »La Progreso« kaj ni postulas, por ke nia centro Ĉ. A. E. al ĝia redakcio, same kiel al redakcioj de aliaj gazetoj, kiuj laboras por E-o, komuniku ĝustatempe ĉiujn nuntempajn gravajn raportojn. 4. Ni esprimas al la komitato de la XIII. kongreso plenan konfidon kaj dankon por ĝia oferema laboro, kiu estis kronita per la plej bona sukceso, kaj ni aprobas proponon de sinjoro Dolanský, membro de germana Societo de esperantistoj en Plzeň, por ke oni donu konvenan respondon al s-ro Ellersiek el Berlin pro malmoderaj atakoj kontraŭ bohema nacio en liaj raportoj pri la XIII. kongreso. Tion plenumos eldonantaro de »La Progreso«.

Atentigo! En monato novembro 1921 estis fondita en Laborista domo »Peklo« kultura asocio »Dělnická akademie«, kaj samtempe legejo, enirebla senpage por regionanoj de Plzeň kaj malfermita ĉiutage de 8a matene ĝis la 7a vespere. Krom bohemiaj gazetoj estas tie elpendigitaj diversaj fremdlandaj esp. gazetoj al dispono por ĉi tieaj esperantistoj. Por esperantistoj el ĉirkaŭaĵo, kiuj ne povas viziti tiun ĉi legejon, estas rekomendinde aboni almenaŭ lokan gazeton, ĉar sole tiel ili povas perfektigi kaj kiel tiaj ili povas varbi novajn interesulojn por esperanto.

Laborista Asocio Esperantista en Plzeň aranĝis de 1. oktobro ĝis la fino de la jaro 1921 sekvantajn kursojn de esperanto en ĉirkaŭaĵo de Plzeň: **Štáhlavy** (45 lernantoj, instruis k-do Pribáň); **Ledce** (21 lern., instr. k-do Šnajdr); **Dolní Lukavice** (35 lern., instruas k-do Hes); **Herní Lukavice** (22 lern., instr. k-do Dolanský); **Újezd anud Doubravka** (25 lern., instruas k-do Pešek); **Stupno-Brásky** (17 lern., instr. k-do Kaiser). Krom tio estis aranĝita unu kurso en Karlov-Plzeň (31 lern., instr. k-do Šnajdr) kaj

du kursoj en Plzeň, Laborista domo »Peklo«, nome posttagmeze kaj vespere (87 lern., instr. k-do Pribáň kaj Pešek). Kelkaj kursoj estas jam finitaj, kelkaj ankoraŭ daŭras, krom tio estas en »Popola scenejo« ĉiumerkrede kaj ĉiuvendre konversacio por progresintoj.

Ĝenerala kunveno de Laborista Asocio Esperantista en Plzeň okazos la 22an de januaro 1922 je la 8a matene en malsupra halo de »Popola scenejo« (»Peklo«). La programo estas jena: Legado de raportoj, elekto de komitato kaj diversaj aferoj. Al tiu kunveno estas ĉiuj geesperantistoj bonvenantaj.

Nacia ekspozicio en Rio de Janeiro (Brazilio) okazos de 7-a septembro ĝis 15-a novembro 1922 por solene festi la centjaran datrevenon de la nacia sendependeco. Brazila registaro, organizanto de la ekspozicio, uzis por eksterlanda propagando servon de Brazila Ligo Esperantista, kiu dissendis belajn esperantajn prospektojn kun ilustraĵoj. La ekspozicio enhavas ĉefajn formojn de laboro, rilatanta al terkulturo, bestokulturo, fiŝkaptado, industrio, transporto, komerco, sciencoj kaj belartoj. Ĝi konsistas el du fakoj: nacia kaj eksterlanda. Oni povas certigi, ke la ekspozicio estos grandioza.

Gvidlibreto de Antverpeno. Sendu simplan internacian respond-poŝtkarton al s-ro Frans Schoofs, 45 Kleine Beerstraat, Antwerpen (Belgujo) por tuj ricevi belan ilustritan 32-paĝan broŝuron pri la urbo Antwerpen, sidejo de nia VII-a internacia kongreso (1911).

Tutmonda adresaro katolika. La Internacio Katolika (IKA) kune kun I. K. U. E. restarigita ekprenas la iniciaton por enkonduki per ĉiuj iloj Esperanton en al katolikaro. Por praktike montri la nunan disvastigon en katolikaj rondoj ĝi volas kiel eble plej baldaŭ eldoni **tutmondan adresaron katolikan** enhavantan ĉiujn adresojn de la jam en la mondo ekzistantaj Esperantistoj katolikaj. Do ni kore petas ĉiujn samideanojn katolikajn tuj sendi sian ekzaktan adreson aldonante la profesion kaj eventuale la fakojn, pri kiuj ili volas korespondadi aŭ interŝanĝi. Oni skribu sub »Adresaro« al **IKA, Graz, Karmeliterpl. 5. Aŭstrujo.**

En orienta Moravio kaj apuda Silezio ankaŭ kreskas nia movado. **En Sviadnov apud Místek** gvidas la kurson s-ro Fr. Štihel. La 9-an de oktobro 1921 parolis tie en kunveno s-ro Jaroš pri »Deveno kaj celo de Esp.«. La 16-an de okt. parolis s-ro Jaroš pri »Signifo de Esp.« s-ro Janečka el Vítkovice pri temo »Kio estas E-o« kaj ĉefinstruisto s-ro Bárta el Poruba apud Svinov pri kurso. **En Frýdek** okazis la 27-an de sept. kaj la 4-an de okt. parolado de s-ro Jaroš pri »Signifo de Esp. por skoltoj«. Ties kurson en lernejo oni devis interrompi pro mobilizo. — **En Pířvoz** instruas s-ro Liška en kurso por fervojistoj, en **Slezská Ostrava** gvidas la kurson s-ro Kubala.

Al ĉefaj samideanoj! Denove mi sendos al Vi la unuan numeron de nia ĉefa propagandilo »**Esperantskv Zpravodaj**«. Mi petas ne resendur ĝin! Ne agu sammaniere kiel faris multaj el ĉefaj samideanoj, kiuj nur la lastajn aŭ la plej lastan numeron (kelkfoje di-

fektitan) **resendis** kun alskribo »Mi ne akceptas!«. Akceptu ĝin kiel veran helpilon, kiu povas paroli anstataŭ Vi **tiam** kaj **tie**, kie **Vi** ne havas okazon ĉiam propagandi kaj se Vi mem ne intencas ĝin aboni, **montru** kaj **rekomendu** ĝin al viaj **konatuloj**, en viaj **kursoj**, **paroladoj**, **elmontraĵoj** kaj **ĉefe** en la publikaj **legejoj** kaj **bibliotekoj**. Helpu, ke oni ĝin abonu en kafejoj, restoracioj, atendejoj k. s. Volu kompreni, ke estas Via devo la **solan** nacian informilon aboni kaj rekomendi. Do: ne resendu, sed **helpu vastigi** ĝin! Por redakcio de »**Esperantský Zpravodaj**«: Julie Supichová. Praha 1. I. 1922.

Malsukceso de Ido.

Prof. D-ro Stöhr anoncis en la gazetoj paroladon en la germana politeknika societo pri la temo: Kial Ido kaj ne Esperanto? Per lumbildoj li volis pruvi ke Esperanto estas malbelsona kaj malscienca kaj plena da eraroj, li anoncis Ido-kurson kaj petis aliĝojn. Ĉeestis multaj geespistoj. Sinjoro Julius Boschan, vicprez. de la »Esp. Verein Verda Stelo«, rifuzis spiritplene kaj kun humoro la atakojn, menciis ke la »malbelsona kaj malscienca« Espo estas sur la tuta mondo amata kaj disvastigata giganto, kiu milfoje pruvis sian plenan taŭgecon kaj tute ne timas la malgrandegulon Ido. Pli bone unu lingvo kun kelkaj plibonigeblaj eraroj, ol du helpilingvoj. La ĉeestantaro multe aplaudis kaj neniu enskribiĝis por la Ido-kurso.

El nia familio. Nia fervora samideano s-o Jan Mikš, Praha-Nusle, kaj f-ino Ot. Stránská el Zdice, anoncas sian fianĉigon. Ni sincere gratulas.

oooo

ATENTIGO!

Ĉar nia ĝisnuna redaktoro de »La Progreso«, s-o B. Tittl, eksiĝis, ni petas, ke oni adresu ĉiujn sendaĵojn rilatantaj la redakcion al In. Gross, redaktoro de »La Progreso«, Plzeň, Houšková ul. 32.

.....

EL ADMINISTREJO.

Pro nunaj tro grandaj elspezoj ne estas al ni eble presi pli grandan nombron da ekzempleroj de »La Progreso«, ol ni havas abonantojn. Pro tio ni petas niajn legantojn, kiuj ne plu volas aboni nian gazeton, anonci tion al ni letere, por ke ni povu fiksi nombron de presotaj ekzempleroj. Kiu tion al ni ne anoncis kaj ne resendas unuan numeron, tiun ni konsideros kiel abananto. La abonprezo por kuranta jaro restas Kĉ 20.—, eksterlande Kĉ 25.—. Eksterlandanoj povas aboni nian gazeton ĉe »Universala Esperanto Asocio«, Geneve, Boulevard du Théâtre 12, Svisujo.

Oficialan organon de »Universala Esperanto Asocio« »Esperanto« oni povas aboni ĉe administracio de »La Progreso« (s-o F. Kavan, Plzeň, Pa-

děbradova tř. 6.) — Membreco kaj abono kostas Kĉ 65.—. Membreco de U. E. A. Kĉ 25.—. Nura abono ne estas nun pli malkare ebla kaj ĝi kostas ankaŭ Kĉ 65.—.

oooo

XIV-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Helsinki — Helsingfors (Finnlando) la 8.—12. de aŭgusto 1922.

La Finnlanda esperantistaro estas konscia pri la granda honoro kaj konfido montritaj al ĝi per la decido okazigi la XIV-an kongreson en nia ĉefurbo. La neatendita sukceso de la Praha kongreso devigas nin prepari ion laŭ niaj cirkonstancoj grandiozan. En la venonta somero la Esperanta mondo festos ne nur sian ĉiujaran kunestadon: estos pasintaj 35 jaroj de la publika apero de nia lingvo. Ankaŭ la movado esperantista ŝajnas esti en komenco de nova epoko. Nia lingvo trovas intereson kaj subtenon ĉe gravaj organizaĵoj, antaŭ ĉio ĉe la Ligo de Nacioj. La laste nomita eble definitive decidis pri akcelado de instruado de Esperanto en ĉiuj lernejoj de la civilizita mondo kelkajn semajnojn post nia XIVa. Nia propra organizo estas en punkto de turniĝo: ni atendas, ke la venonta kongreso starigos la universalan ligan de ĉiuj esperantistoj.

En tiuj cirkonstancoj la Loka Kongresa Komitato kaj la Finnlanda esperantistaro streĉos siajn fortojn por laŭ sia kapablo antaŭzorgi pri la sukceso de la estonta kongreso. Ni scias, ke ni ne povos prezenti tiajn monumentojn de miljara civilizo, kiel la landoj mez-Eŭropaj, sed ni esperas, ke vi vidos signojn pri juna, vivipova kulturo. Se ni ne povos montri famajn kastelojn, ni havas almenaŭ la unikan naturon de la insulara lagaro. Kaj jam la alveturo per komforta ŝipo trans la ondoj de Baltika maro prezentas eksterordinaran plezuron.

La vojo al Finnlando ne estas tiel longa, kiel prezentas al si la ĝenerala opinio. Ni volas ĝin tamen mallongigi laŭ niaj fortoj. Ni havas bonajn esperojn ricevi rezervitajn ŝipojn por la kongresanoj, kiuj povos veturi el la havenoj Hull, Antwerpen, Stettin. La delegitoj de U. E. A. promesas per aranĝo de karavanoj deŝarĝi le alvenontojn je ĉiuj zorgoj. Verŝajne ni povos sendi akceptantojn ĝis la nomitaj havenoj. Kompreneble nur sub la kondiĉo, ke la samideanoj sufiĉe frue decidiĝos pri partopreno en la karavanoj.

La precizan daton de la kongreso ni ne volis ankoraŭ fiksi definitive, ĉar ĝi eble dependos de la interkonsento farota kun la ŝipkompanio. Ni tamen esperas, ke la dua semajno de aŭgusto (6.—13.) konvenos.

La sukceso de la estonta kongreso ne dependas sole de ni. Ni bezonas la internacian publikon esperantistan. Certe, el kelkaj landoj la alveturo estas facila, kaj por ĉiuj ĝin faciligas multe la malalta kurzo de finna mono. Sed ni ankaŭ bezonas vin ĉiujn. Por ke la kongreso povu forte efiki ankaŭ sur la eksteran publikon, estas necesa ne nur multnombra partopreno, sed ankaŭ reprezento de plej multaj landoj. Tial ni turnas nin aparte al la so-

dietoj esperantistaj en tiuj landoj, el kiuj oni ne povas atendi multajn alveturojn, kun la insista peto, ke ili jam nun pensu pri kolekto de mono en la celo esti inde reprezentataj en la kongreso. Se la esperantistoj en tiuj landoj, el kiuj estas malfacile alveturi al la kongreso, zorgos pri tio, ke ili povu pagi la vojaĝkostojn por almenaŭ unu reprezentanto, ili faros servon ne nur al sialanda movado, sed al la tutmonda movado esperantista. La ĉeesto de tiaj reprezentantoj, elektotaj kompreneble el la plej konfidataj samideanoj, pligravigos ankaŭ la decidojn farotajn en la plej signifoplenaj demandoj de esperantismo.

Kompreneble ni ne atendas nur pli-malpli oficialajn delegitojn. Ni esperas, ke la norda naturo allogos multajn turistemajn esperantistojn, kaj ni penos agrabligi la restadon por ili, zorgante pri interesaj ekskursoj post la kongreso.

En la espero, ke la tutmonda samideanaro per sia fervoro certigos la plenan sukceson de la dek-kvara mondfesto de Esperanto, ni sendas nian unuan komunikon.

Unua komunikado.

1. **L. K. K.** La Loka Kongresa Komitato, elektita de la estraro de Esperanto-Asocio de Finnlando, kosistas el jenaj personoj: S-ro **Albin Sandström**, prez., lektoro **K. S. Ahonius**, vicprez., s-ro **Vilho Setälä**, ĝen. sekr., s-ro **G. Černohostov**, sekretario, kaj s-ro **Leo Jalava**, kaskisto.

2. **Adreso.** La oficiala poŝta adreso de la Kongreso kaj de L. K. K. estas: XIV-a Kongreso de Esperanto, Helsinki (aŭ Helsingfors), Finnlando. Ĉiuj korespondadoj, koncernantaj la kongresajn aferojn, ankaŭ mensendoj, estu adresataj nur al tiu adreso. Telegram-adreso estas: Esperanto, Helsingfors.

3. **Aliĝo.** Samideanoj, dezirantaj aliĝi al la XIV-a estas petataj uzi la aliĝilojn eldonotajn de la L. K. K. La aliĝiloj estos dum novembro-decembro dissendataj kun la plej multaj esperantaj gazetoj. Samideanoj, kiuj tiel ne ricevos la aliĝilon, petu ĝin de la L. K. K.

Samideanoj, kiuj jam nun aliĝas, sed pro ne antaŭviditaj kaŭzoj tamen ne povos ĉeesti la kongreson, ricevos, se ili ne volas fariĝi helpkongresanoj, 75% de la pagita kotizo, se ili pri tio sciigas la L. K. K. antaŭ la 1-a de julio 1922. Pri kurza diferenco la L. K. K. tamen ne respondas.

En la kongresan nomaron estos enskribitaj nur la personoj, kiuj aliĝis kaj pagis la kongresan kotizon.

Ĉar por la bona prosperado de la porkongresaj laboroj estas tre necese, ke la L. K. K. jam tuj en komenco havu je sia dispono sufiĉe da mono, la samideanoj-aliĝontoj estas serioze petataj kiom eble plej baldaŭ aliĝi kaj pagi la kotizon.

4. **Kotizo.** La fikso de la Kongresa Kotizo estas tre malfacila al L. K. K. Ni konsideris, ke la sumo efektive pagota de la altvalutaj landoj povas esti pli alta ol tiu pagota de la malbonvalutaj, tamen ne tiel, ke la lastenomitaj kaŭzoj puran malprofiton al la kongresa

kaso. Tiel serĉinte ian mezon, ni venis al jena tabelo:

4 dolaroj, 12 guldenoj, 20 ŝilingoj, svisaj frankoj, skandinavaj kronoj, pesetoj, 25 franc. kaj belgaj frankoj, 30 liroj, 50 finnaj markoj, 60 germanaj markoj, Ostmarkoj, ĉeĥaj kronoj, bulg. kaj rum. leoj, 80 dinaroj kaj drakmoj, 150 hungaraj kronoj, estonaj markoj, latvaj rubloj, 300 aŭstriaĵ kronoj, 500 polaj markoj.

Ĉiu pagas en la mono de sia lando. Samideanoj el landoj kun aliaj monunuoj krom la suprenomitaj pagu aŭ dolarojn, ŝilingojn aŭ frankojn aŭ petu pri speciala aranĝo.

Pluaj samfamilianoj pagas nur 60% de la kotizo.

Post la 1-a de junio 1922 la kotizo altiĝos je 50%.

5. **Helpkongresanoj.** Samideanoj, kiuj ne havos okazon ĉeesti la XIV-an kongreson, povas tamen helpi al ĝia bona sukceso, aliĝante kiel helpkongresanoj. La helpkongresano pagas la kongresan kotizon kaj ricevos la kongresan insignon kaj ĉiujn kongresajn dokumentojn.

6. **Garantia kapitalo.** Por certigi la ekonomian rezulton de la XIV-a estas fondata speciala Garantia Kapitalo, al kiu la samideanoj estas petataj noti garantiojn po almenaŭ 300.— Fmk. La garantiitaj sumoj estos enkasigataj nur en la okazo ke la kongresaj elspezoj superos la enspezojn, kaj proporcie laŭ ebla malprofito.

7. **Donacoj.** Sub tiu ĉi rubriko ni notas donacojn, faritajn al la kongresa kaso. Ĉar la organizaj elspezoj estas tre grandaj, kaj nur parte povos esti repagataj per la kongresa kotizo, la L. K. K. sin turnas al ĉiuj samideanoj, petante monsubtenon sub ĉi tiu rubriko.

BIBLIOGRAFIO

Transmara reveno de ĉeĥoslovakaj legioj el Siberio Ĉeĥoslovakujon. Tiu ĉi belega verko pri-skribas per multe da neotipiaj ilustraĵoj la longedairan revenon de ĉeĥoslovakaj batalantoj, kiuj ankoraŭ post atingo de la memstareco de sia patrujo devis batali en Siberio. Unu grupo post alia revenis el Malproksima Oriento, farinte kaŭze de la mondmilito vojaĝon ĉirkaŭ la tuta terĝlobo. La ilustraĵoj prezentas kortuŝantajn eĉ gajajn momentojn el vivo de la soldatoj. Ni vidas pejzaĝojn, kiujn ĉeĥoslovakaj soldatoj traveturis kaj ni vidas diversajn tipojn de loĝantaro. Pro tio havas la verko grandan valoron kultur-historian kaj ni ĝin rekomendas al ĉiu. La eldonantaro de tiu verko, uzinte Esperanton, aprobas nian lingvon taŭga por propagandaj celoj. — Prezo Kč 140.—. Mendojn akceptas »Bohema Esperanto-Servo«, Moravany, Ĉeĥoslovakio.

ooo

KORESPONDADO.

Ĉeĥoslovakio: Bystřice Hostýn, s-o Al. Klabačka, poŝtestro, deziras interŝanĝi PM, sendu rekom. 20—100 PM de via lando kaj vi ricevos saman kvanton da ĉeĥoslovakaj PM.

Rusujo: Gomel, Poŝtkesto 23, s-o J. Sapirstein, deziras koresp. per leteroj kaj vidajkartoj k. ĉ. l.

Knihy, jež možno obdržeti v naší administraci.

pouze proti placení předem, na zaslanoú složenku, po objednávce s připočtením porta, jiných knih nevedeme

B. Tittl: Slovník esperantsko-český, vázaný	Kč 7.50
Slovník esperantsko-český, brož.	Kč 5.—
Časopis »La Progreso«, roč. 1918	Kč 4.50
Časopis »La Progreso«, roč. 1919 Nroj. 5—10	Kč 4.—
Časopis »La Progreso«, roč. 1920	Kč 16.—
Časopis »La Progreso«, roč. 1921	Kč 20.—
Tittl: Krátká mluvnice Esp.	Kč 0.30
Čejka: Slovník esp.-čespý, brož.	Kč 7.80
Čejka: Slovník čes.-esperantský	Kč 3.30
Čejka-Krumpholz: Malá mluvnice Esperanta	Kč 3.10
Šupichová: Esperanto. Slovník a mluvnice, doporučena ministerstvem vyučování pro kursy a samouky.	Kč 8.80
Novák: Čeha literaturo.	Kč 8.—
Dr. Absolon: Moravia Karsto.	Kč 7.50
Esp. movado en Moravio	Kč 4.—
Kamaryt: Úvahy o jaz. mezinár.	Kč 0.80
Jazyk všeslovanský a Esp.	Kč 0.20
»O dvoji pravdě«	Kč 14.—
per niaj abonantoj	Kč 12.—
Kühnl-Procházká: Slovník česko-esper. b) brožovaný	Kč 18.—
vázaný	Kč 24.—
Vortoj de Zamenhof, na lepším papíře	Kč 6.—
Sherlock Holmes	Kč 4.50
Božena Němcová: »Babička«, fino de traduko »Avineto«	Kč 2.50
J. S. Machar: Benedek	Kč 3.60
Gvidlibro tra Praha	Kč 3.60
Výtah z Kotzina: Na obranu esper.	Kč 2.40
Co je esperanto	Kč —.20
Krestanov: Bulgara lando kaj Popolo	Kč 20.—
E. Privat: Vivo de Zamenhof	Kč 48.—
Por kongresaj glumarkoj	Kč 10.—
100 Esper. insignoj »U. E. A.«	Kč 8.—
Esper. insignoj malgrandaj pingloj	Kč 4.—
Esperanta insigno E. brožoj	Kč 5.—
Esperanta kantaro. Tekstaro de diversaj popol. kantoj	Kč 3.—
muzika eldono	Kč 7.—
La Espero. Himno Esperantista. Poezio de Zamenhof, muziko de Měníl, por fortepiano	Kč 4.—

Čehaj kolegoj de metal- kaj elektroteknika fako!

Kiu povus havigi al mi skribmašajn trakopiajojn de čehaj komercleteroj? Lernante la čehan lingvon mi bezonus ilin por perfektigi en la korespondado. Mi rekomencos laudezire kaj havigos al kolegoj, kiuj lernas nian lingvon, germanajn komercleterojn.

Fritz Michalek, oficisto, Reichenberg,
Lerchenfeldstr. 20.

Samideanoj el landoj de centra kaj orienta Eŭropo povas aboni

„Hispana Esperantisto“

ĉe so. F. Šilha, Praha II., 460 u Karlova.

La gazeto estas ilustrata. 16 paĝoj, kun riĉa kaj interesa enhavo ankaŭ pri Ĉeĥoslovakio.
Jara abono 45.— Kč.

Kolekto de »La Esperantisto«. N-ro 1.

ZAMENHOFA KURSO DE ESPERANTO POR ĈEĤOJ

ENHAVO:

Antaŭparolo de D-ro L. L. Zamenhof. Gramatiko. Fundamenta ekzercaro kun ĉeha traduko. Esperanta-ĉeha radikkvortaro. Legaĵoj. Anoncoj.

32 dukolone presitaj paĝoj, gazeta formato (30×21 cm), eldono 20.000 ekzempleroj.

Prezo Kč 1.—.

Ĉefdeponejo: R. Ĉech, vicdel. de U. E. A., Wien IX., D' Orsaygasse 7/23.

Via horloĝo funkcios precize se vi ĝin donos por rebonigi al

FR. NOVÁK,

horloĝisto en Praha I.
Malé nám. 10.

Horloĝoj. - Juveloj. - Esp. insignoj de esp. klubo en Praha. - Esp. glumarkoj, kolekto da 12 div. specoj, 100 pecoj Kč 4.—, afrankite Kč 5.—, 1000 pec. Kč 35.—, afrankite Kč 37.50.



LA ESPERANTISTO.

ORGANO DE ESPERANTA
UNIVERSITATO POPOLA.

Dediĉata al la interna ideo de l' Esperantismo.

Jara abono: 8.— Kč.

Redakce:

WIEN II., POSTAMT 34.

Eldonanto: Esperantista klubo en Plzeň. — Responda redaktoro: In. Gross, Plzeň, Houškova ul. 32. Presis laborista presejo, Plzeň.